# *Internacia Foiro de Konstruado: speciala evoluzono de Mariel.*




La speciala evoluzono de Mariel (ZEDM) estos prioritata en la teoria programo de la X-a Internacia Foiro de Konstruado, FECONS 2014 kiu eksesiis en la havana ekspoziciejo Pabexpo.

Ekde tiu ejo oni informos pri la negoceblecoj kiuj rilatas aparte al la konstrua sektoro, samkiel ties doganaj, impostaj kaj laboraj stimuliloj.

La in?enierado pri ligno estas alia temo debatata flanke de la reprezentantoj de la franca kompanio Industrie Bois, dum la itala ITALPANNELLI S.R.L. raportos pri siaj ?efaj produktoj kaj servoj.

Dum la evento  pli  ol 160 reprezentantoj el 23 landoj ekspozicias siajn produktojn; la evento estas unu el la plej grandaj de sia tipo okazintaj en Kubo ekde la unua, kiu efektivi?is en la jaro 1998.

Brazilo, ?inio, Meksiko, Francio kaj Hispanio estas inter la landoj pli reprezentataj en la grava komerca borso.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/20008-internacia-foiro-de-konstruado-speciala-evoluzono-de-mariel

# Radio Habana Cuba